

La Espero

TROFEO FVNE



AL SEF

BILDOJ

EL ATENO

Redaktoro

Kiel vi vidas aliloke nia antaŭa redaktoro Tiberio Morariu fariĝos 75 fine de septembro. Fakte ni devus dediĉi al li pli da spaco, sed kiel vi vidas granda parto de ĉi numero estas dediĉita al la UK en Ateno kaj al nia literatura giganto, Kolomano Kalocsay.

La jubileo de Morariu igas nin pensi iomete pri la paso de la jaroj kaj la ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj de la socio kaj de la esperantomovado. Tiberio Morariu estis ĉefe Cseh-instruisto kaj prelegisto kaj li estas ankoraŭ juneca kaj vigla, sed kiel Cseh-instruisto li sendube apartenas jam al tempo pasinta, al epoko kiu finiĝis.

En la 30-aj jaroj Svedujo estis lando ankoraŭ relative izolita, almenaŭ se oni konsideras la landon ekster la grandaj urboj, kie vivis la plejparto de la loĝantaro. Per gazetoj kaj radio oni kompreneble informiĝis pri la ekstera mondo kaj atente sekvis la okazaĵojn sur la internacia scenejo. Sed la homoj ĝenerale havis malmultan kontakton kun eksterlandanoj; eksterlandaj vojaĝoj estis ankoraŭ ekskluzivaĵoj por riĉuloj aŭ por aventuremuloj, kaj malmultaj eksterlandanoj vivis ankoraŭ ĉe ni.

Mi mem memoras, kiel ekscitita mi fariĝis kiam mi ricevis la unuan esperantan leteron de eksterlando, el lando tiel proksima kaj simila al Svedio kiel Nederlando, sed por mi jam ekzotika fremda lando. Eksterlandano estis tiam en la svedaj urbetoj se ne sensacio almenaŭ io eksterordinara. Kaj kiam esperantistoj aranĝis kursojn kun eksterlandaj

instruistoj, kiuj eĉ ne scipovis la svedan, la homoj venis eĉ pro nura scivolo. Henrik Seppik, Elinjo Pähn, Tiberio Morariu kolektis amasojn por siaj kursoj. Roland Dupuis alvenis pli malfrue, post la epoko de la amaskursoj.

Kiam oni anoncis prelegojn de eksterlandanoj, el esperanto interpretitajn en la svedan, same venis multaj homoj, ĉar almenaŭ en la kamparaj vilaĝoj kaj urbetoj tio estis io eksterordinara. Jam rumano/hungaro kiel Morariu estis tiutempe «ekzotikulo».

Hodiaŭ vivas meze inter ni eksterlandaj «gastlaboristoj» kaj enmigrintoj kaj por svedo libertempa vojaĝo en la eŭropa kontinento aŭ eĉ en aliaj kontinentoj ne plu estas multe pli granda evento ol simila veturo en nia propra lando. Ne plu alvenas homoj al niaj prelegoj nur pro tio, ke la prelegisto estas eksterlandano; efektive oni ne plu ŝatas la tedan interpretadon. Se ni vere aranĝas ion tian, la preleganto devas havi ion eksterordinaran por prezenti. Kaj por logi homojn al niaj kursoj ni certe bezonas pli «ekzotikan» instruiston ol rumanon.

La socio ŝanĝiĝis, kaj ni esperantistoj devas tion akcepti kaj adapti niajn metodojn al la novaj cirkonstancoj. Ĉar - malgraŭ ĉiuj progresoj de la tekniko - la homaro ne sukcesis solvi ĝis nun tiun gravan problemon: la lingva interkomunikado.

Ake Blomberg


Jubileo: «Io Iu» baldaŭ 75-jara

Jaroj pasas. Tiberio Morariu fariĝos 75, la 28-an de septembro. Tiberio Morariu estas konata nomo al tre multaj svedaj esperantistoj, kaj li estas bone konata ankaŭ en la internacia esperanto-movado.

Oni kutimas nomi lin rumano, sed li estas fakte pli hungaro, naskiĝinta en Transsilvanio, en urbo Kosice kaj pasiginta siajn plej junajn jarojn en la universitata urbo Cluj. Tie li konatiĝis kun Andreo Cseh, la fama kreinto de la Cseh-kursoj, kaj naskiĝis inter ili profunda amikeco, kiu ankoraŭ daŭras.

Tiberio Morariu fariĝis mem Cseh-instruisto, kaj kiel tia li venis en Svedujon la 28-an de septembro 1928. Poste li traveturis la landon kaj gvidis kursojn en la plej diversaj lokoj de nia lando. Pro sia vigla temperamento kaj streĉa atento al ĉiuj kursanoj, li apartenis al la vera elito de Cseh-metodaj instruistoj. Pri tiu fakto atestas, ke konsiderinde multaj el liaj kursanoj vere fariĝis lertaj kaj entuziasmaj esperantistoj kiuj ankoraŭ hodiaŭ restas en nia movado.

Tiberio Morariu estis de 1941 ĝis 1944 sindiko de SEF, ĉefe pro la iniciato de Martin Fejde en Jönköping. De 1953 ĝis 1970 li



estis redaktoro de «La Espero», kaj ĝis ĉijare — kiam ŝanĝiĝis nia prestekniko — li ĝenerale kunhelpis kontroli la kompostaĵon de la gazeto, kiu tiel povis konservi sian altan lingvan nivelon.

Tiberio Morariu estas nun pensiulo sed li restas juneca kaj dinamika kaj certe povas ankoraŭ multon doni al nia esperanta movado. Ni deziras al li tre feliĉan festotagon kaj ankoraŭ multajn aktivajn jarojn!

Ake Blomberg

Trofeo: Granda honorigo

Ĉu SEF estas la plej bona landa asocio de UEA? Ni mem ne kredas tion, sed la estraro de UEA opinias, ke SEF dum la lasta jaro «*faris aparte grandan kontribuon al la progresigo de esperanto kaj tute aparte de UEA*». Pro tio SEF ricevis, kiel la unua, novan trofeon nomata Trofeo Fyne. Sed legu mem pri ĝi en letero, kiun la prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin, sendis al la svedaj esperantistoj:

«*Karaj gekolegoj,*

Antaŭnelonge, kanada esperantistino prezentis novan trofeon al UEA. La Trofeo Fyne, laŭ ties regularo, estas aljuĝata ĉiun duan jaron al landa asocio kiu faris aparte grandan kontribuon al la progresigo de esperanto kaj tute aparte de UEA. Dum la alternaj jaroj, la gajninta landa asocio aljuĝas la trofeon al tiu loka grupo aŭ regiona organizo kiu plej efike kontribuis al la agado de la landa asocio.

Por la jaro 1975, la Estraro de UEA aljuĝis la Trofeon Fyne al la Sveda Esperanto-Federacio.

La estraro elektis SEF precipe pro ĝia granda kontribuo al la varbado por UEA. Dum jaro de malfacila varbado, post iom drasta altiĝo de la membrokotizoj, SEF sukcesis teni proksimume saman nombron da membroj en la diversaj individuaj kategorioj... kun unu granda escepto. La escepto rilatas al la Societo Zamenhof, nova societo por mecenatoj de UEA fondita fine de 1974. El proksimume 170 membroj de la Societo dum 1975, ĉirkaŭ 20 procentoj estis svedoj, kaj Svedujo okupis unuan lokon inter la landoj reprezentitaj en la Societo.

La sindono de la svedaj esperantistoj kaj ilia efika kaj lojala subteno de UEA estas nur unu admirinda aspekto de la sveda esperantomovado. Laborante en lando kie la influo de la angla lingvo estas aparte forta, kaj kie esperanto sekve ne ĝuas tiel altan influon aŭ reputacion kiel en kelkaj aliaj landoj, la parolantoj de esperanto en Svedujo regule aperigas tre trafajn kaj modernajn informilojn pri esperanto (kiuj povus esti ekzemploj kaj modeloj por ĉiuj niaj landaj asocioj), funkciiĝas bonan informan aparaton, kaj nutras aparte viglajn lokajn aktivecojn kaj grupan vivon.

Kvankam normale ni aljuĝus la Trofeon Fyne la unuan fojon en 1976, ni decidis aljuĝi ĝin al SEF por 1975, tiel ke en 1976 la Federacio povu jam pludoni ĝin al sia plej vigla loka grupo. Ĝi estu konsiderata de la svedaj esperantistoj kiel malgranda simbolo de la efikeco de ilia laboro, niaj esperoj pri la estonteco, kaj la aparta respondeco kiun portas en UEA, kaj en la esperantomovado ĝenerale, la Sveda Esperanto-Federacio.»

La aljuĝo de la Trofeo Fyne al SEF ne restu nur simbola ago. Ni montru, ke ni meritis ĝin: per plia subteno al UEA kaj, precipe, per pli intensa laboro por esperanto!

Några intryck
från Universala
Kongreso de
Esperanto

ATÉN

Visst var det varmt. Så varmt att t o m italienska deltagare på 61-a Universala kongreso de Esperanto tyckte att det var varmt i överkant. Men det gick att stå ut med det, dvs om man inte envisades med att gå i solen mitt på dagen. För det behövde man inte. Kongressprogrammet var anpassat till de lokala förhållandena, så att ingenting ägde rum mellan kl. 13 och 17. Att gå och lägga sig efter lunchen blev en naturlig vana — och så orkade man vara med på det mesta på kvällen.

Från Sverige hade ett femtiotal deltagare sökt sig till Atén; bara hälften mot ett hundratal i vanliga fall. Rädslan för augustivärmen var tydligen stor. Organisatorerna var också medvetna om den och räknade inte heller med fler än 1000 deltagare. Det kom drygt 1200 trots allt. Det innebar att en del reserverade lokaler blev plötsligt för små, så

uppåt i den snart 2500 år gamla templet. För att inte tala om alla andra tempel utanför Atén och om deras omgivningar. «Gudarna vet vad som är vackert», vad det någon som tyckte, när han försökte beskriva Delphi och naturen omkring den gamla kultplatsen.

Man kommer inte till världskongresser bara för att turista. Viktigast är alla diskussioner om esperantorörelsen, om dess alla förgreningar: facksammanträden, paneldiskussioner, Komitato (UEAs beslutsorgan), sommaruniversitetet med alla föredrag, kulturella arrangemang. Och framför allt möjligheten att tala, höra, sjunga, viska, skrika esperanto under en hel vecka.

Ur den mängd intryck som finns så här strax efter kongressen får jag plocka fram de mest relevanta:

De officiella kontakterna: jag kommer inte ihåg någon annan kongress som var lika på-



Kongressens invigning i hotell Hilton samlade drygt 1200 deltagare och gäster. På första rad syns representanterna för Italiens och Polens ambassader

att större fick ordnas — med följd att ofta visste man inte var något skulle äga rum. Sådana ändringar var så många, att man gav ut en särskild bulletin varje dag, *Kongresa Kuriero*, som även innehöll allmän information om programmen.

Kongressens program är som ett stort smörgåsbord, där man väljer ut det man är mest intresserad av. I Atén fanns det gott om turistprogram: det finns väl inte många städer som bättre än Atén lämpar sig för ett turistbesök, med kulturhistoria inpå hela tiden, i staden och runt den. Många passade på att bekanta sig med de fantastiska fornminnena. För fantastiska är det. Jag kan inte beskriva hur liten jag kände mig, när jag stod under Parthenon på Akropolis och tittade

passad av olika myndigheter som denna, med olika regeringsrepresentanter närvarande vid öppnandet, vid olika bjudningar, på diskussioner; med Aténs båda borgmästare. Och ofta var pressen och teve också där.

Greka vespero, en kväll med grekisk sång och dans, uppförd av Dora Stratou-gruppen, eliten bland dansgrupperna i Grekland. Uppförd i det fria på Filopapu-kullen intill Akropolis, i en föreställning bara för kongressens deltagare. Hela tiden hördes cikadorna runt om scenen. Och efteråt vandringen på Akropolis-kullen, trängseln bland turisterna och plötsligt igen den belysta Parthenon mot en alldeles svart himmel. Oförglömligt!

Teatra vespero med Bulgara Esperanto-Teatro och Molières «Ätenskapskolan», in-



En la halo de la kongresejo interparolis Inga Peterson el Helsingborg kun Linnéa Edsenius el Nybro. Ambau ĵus estis en kunveno pri virina agado. En tiu diskuto partoprenis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ greka parlamentanino, sinjorino Tsuderou, kaj greka profesorino, sinjorino Kalegeropulou. La greka televido registris parton de la diskuto.

La greka profesorino parolis pri la antikva tempo, kaj opiniis ke en iu senco la virinoj estis tiam pli liberaj ol nun. La virinoj regis solaj en la domo (sed ja ne havis voĉdonrajton). La parlamentanino diris, ke nuntempe la virino havis pli da rajtoj, sed en la greka parlamento estas nur 7 virinoj el 300 parlamentanoj.

Poste oni multe parolis pri la situacio de virinoj en diversaj landoj. Grekino rakontis pri la virina tago en Grekland, kiam la virinoj por unu tago prenas la rolon de viroj: iras al kafejo, ludas kartojn, trinkas, batas la virojn. Tiam la viroj devas resti hejme aŭ iri al preĝejo.

En la diskuto venis la ideo fondi komisionojn de virinaj esperantistoj en diversaj landoj. Linnéa Edsenius estis skeptika pri tio kaj demandis pri la celo. Ŝi opiniis, ke tiuj komisionoj devus labori por fariĝi akceptitaj instancoj, ekzemple kiel referencaj instancoj por ŝtataj esploroj.

ledd med lite Mozart-musik (som i min tillfällige grannes öron inte passade ihop).

Diskussionerna om esperantorörelsen och om våra framtida uppgifter. Mer konkreta, mer målmedvetna. Med positiva tecken på att det går framåt.

De nya ansiktena, oftast unga, tyder på att esperantorörelsen håller på att förnygras. Det ser man i *Komitato*, och bland kongressdeltagarna i allmänt. Från TEJO-kongressen i Thessaloniki rapporterar man 380 deltagare: den största TEJO-kongressen hittills utanför Östeuropa.

Franko Luin



SEJU vill att vi ska träffas i Skåne i höst, i Göransborg utanför Höör. Det blir den 1, 2 och 3 oktober. Kostnaden för hela kallasen blir 60 — 75 kronor. Med mat och logi! Skriv några rader att du kommer med. SEJU, Fack, 122 04 Enskede.

Några beslut
om utvidgat
samarbete

ATEN

Fler länder ansluter sig till UEA

i DDR har sedan länge funnits en fungerande esperanto-organisation, som inte varit ansluten till det internationella förbundet (UEA). Verksamheten har stabiliserats under de senaste åren, och man har omkring 1000 medlemmar. Organisationen ställning har tidigare varit något oklar, eftersom man inte arbetar som helt självständig organisation, utan inom det östtyska «Kulturbund», som en av flera verksamhetsgrenar (de övriga är bl a litteratur, fotografi, filateli). Under det senaste året har *Centra Laborrondo Esperanto* gjort en översyn av sina riktlinjer för att tillgodose kraven på att UEAs neutralitet skall respekteras. Under kongressen i Aten kunde därför CLEs ansökan till UEA accepteras.

i Sydkorea har tidigare existerat flera parallella esperantoförbund, varav ett varit anslutet till UEA. Under det senaste året har de gått samman och den nya organisationen har



Edukado estas unu el la ĉefaj intereso de *Olle Olsson* el Lund, emeritita instruisto. Li intencis iri al konferenco de esperantistaj instruistoj en San Marino, unu semajnon antaŭ la kongreso de Ateno. Sed tio ne eblis, kaj en Ateno li iris marde al kunveno de komisiono pri edukado por aŭdi raporton pri la agado de la instruistoj.

En la konferenco en San Marino oni decidis pri altigo de la kotizo, pri reelektio de la estraro, kaj pri kontrakto de kunlaboro inter la instruista organizo ILEi kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Franca instruisto, R. Lentaigne, raportis pri la movado *Freinet*, kiu nun konferencis en Varsovio. *Freinet* laboras por enkonduki novajn metodojn de instruado en la lernejojn, kaj ankaŭ interesiĝas pri esperanto.

Ankaŭ pri lernejaj eksperimentoj oni raportis en la kunveno pri edukado. La eksperimento de la dua regiono, nome en lernejoj inter alie en FR Germanio, Francio kaj Belgio, laboros ankoraŭ unu jaron, kaj poste la sciencaj gvidantoj faros statistikojn kaj konkludojn pri ĝi.

ansökt om anslutning till UEA, vilken accepterades.

Utvecklingen i Tjeckoslovakien är motsatt den i Sydkorea. Esperantisterna i landet arbetar under svåra förhållanden sedan slutet av 50-talet. Den ena av de två delrepublikerna, den tjeckiska, har sedan några år tillåtit esperantisterna att organisera sig, medan de slovakiska esperantisterna först nu fått den möjligheten. Det existerar fortfarande ingen tjeckoslovakisk organisation. Därför har UEA nu accepterat Slovakiska Esperantoförbundet som en andra ansluten sektion i Tjeckoslovakien, men med förbehållet att de två organisationerna skall aktivt arbeta för att få till stånd en sammanslagning.

Lärare

Det internationella esperantoförbundet för lärare (ILEi) har haft interna organisationsproblem under de senaste åren, sedan man 1974 först beslöt om närmare samarbete med UEA och omedelbart därefter helt drog sig ur det samarbetsavtal som tidigare funnits. På sin konferens i San Marino i juli i år antog ILEi ett nytt utkast till samarbetsavtal, som blev giltigt i och med att UEA också antog det under kongressen i Aten.

Information om esperanto

En av UEAs viktigaste arbetsuppgifter är att samordna informationen om esperanto. Visserligen är förhållandena olika i olika länder, saker som är självklara i ett land kan vara politiskt omöjliga eller farliga i ett annat land, myndigheternas inställning varierar osv. Men en hel del grundläggande material är ändå gemensamt.

En speciell arbetsgrupp håller på att samla



Multaj el la svedoj venis per la karavano aranĝita de gesinjoroj Kühlmann el Kopenhago. Unu el ili estis *Barbro Karlsson* el Lysekil. En la unua tago de la kongreso, dimanĉo, ŝi staris ĉe la enirejo de la granda salono en hotelo Hilton, kune kun kelkaj amikoj.

«Ni alvenis jam merkrede», ŝi diris. «Kaj ni restos du semajnojn en Ateno». Ŝi faris jam ekskurso al alia urbo, sed ĉefe ripozis. En la plej varmaj horoj de la tago ŝi dormis. «siestis».

Ateno estas tre granda urbo kun 2,5 milionoj da enloĝantoj. Tial ĉiuj distancoj en la urbo estas longaj. La grupo loĝis en hotelo Museum, kaj necesis veturi per autobuso al la kongresejo. *Barbro Karlsson* ofte veturis per taksio al la altlernejo «Pantios», en kiu estis ĉiuj laborkunsidoj.

Sed en la dimanĉo ŝi ankoraŭ ne decidis, kiujn kunsidojn ŝi volas partopreni. Ŝi aliĝis al ekskurso al Sunion, bela loko ĉe la maro, kun antikva templo. Ŝi ankaŭ intencis partopreni konversacion rondon. Pri alio ŝi volis decidi pli poste.

in och analysera det informationsmaterial som används i olika länder och i olika specialförbund. Det svenska materialet anses



Greklands biträdande handelsminister representerade den grekiska regeringen vid invigningen (i mitten, med mörk slips). Representanter för andra ministerier var också närvarande bland gästerna.



Alia instruisto estis en Ateno, nome *Torsten Farm* el Sundsvall, kune kun sia edzino *Olga Farm*. Ili ne ŝatis la varmon de Ateno — sed opiniis, ke la ekskursaj aŭtobusoj estas pli tolereblaj, speciale en la ekskurso al Akropolo.

La prelegejoj tamen estis malvarmaj, ĉar klimatizigo funkciis la tutan tempon. Meze de la semajno Olga kaj Torsten Farm sidigis dum momento en la ombro de arbo ekster la kongresejo, kaj rakontis pri la podia diskuto. Ĝi temis pri «kiel nuntempe argumenti por esperanto». En la diskuto oni parolis pri la angla lingvo, kaj John Wells (fonetikisto el Britio) diris, ke eksterulo neniam povas lerni la anglan lingvon. Li diris, ke ekzemple la esperanta vorto «provi» estas ok vortoj en la angla, kaj ĉiuj havas kromsignifojn; unu el la ok vortoj eĉ estas insulta.

intressant, och arbetsgruppen räknar med att ta fram en särskild sammanställning av det materialet i översättning till esperanto under nästa år.

Ett svårare arbetsområde är information om esperanto i de länder där det inte finns någon esperantoorganisation, t ex många av uländerna. Arbetsgruppen kommer att försöka ta fram affischer som på slagkraftigt sätt presenterar språkproblemet. Man kan anta, att även andra länders esperantister kommer att utnyttja affischerna, om projektet lyckas.

Länder utan organisationer

Den som vill arbeta med esperanto i ett land där det inte finns någon esperanto-organisation har tagit på sig en svår arbetsuppgift.



Humphrey Tonkin, ordförande i UEA, under kongressens invigning. Här riktar han ett tack till de många närvarande gästerna

Oftast saknas överhuvudtaget material för verksamheten: broschyrer, kursböcker, ordböcker osv. Att framställa sådant material är mycket dyrt, även om man gör det så enkelt som möjligt. I många fall är det redan oöverkomligt dyrt att skaffa material på något av de stora språken (engelska, tyska, franska, spanska osv), och det skulle vara en alltför stor belastning på esperantoförbunden i t ex England, Tyskland, Frankrike och Spanien att be dem leverera material gratis till dem som begär det.

Den arbetsgrupp inom UEA som sysslar med de här problemen har därför beslutat be de olika organiserade esperantoförbunden att ställa upp med hjälp i olika former. En särskild fond som skall administreras tillsammans av det Jugoslaviska esperantoförbundet och UEA beslöts under kongressen i Aten.

Det svenska förbundet har nyligen fått en förfrågan om hjälp att trycka en broschyr om esperanto på maltesiska.

Utveckling av kongresser och konferenser

Varje år organiseras hundratals kongresser, konferenser, årsmöten mm av esperantoförbunden runt om i världen. Deltagarantalet varierar från några tiotal till några tusental personer. Kvaliteten på arrangemangen varierar naturligtvis också starkt.

En särskild arbetsgrupp har till uppgift att se över den verksamhet som finns och ta fram förslag hur man kan förbättra den. Arbetsgruppen har prioriterat arbetet med att utveckla världskongresserna (Universala Kongreso, UK), och föreslår bl a att huvudtemat för kongresserna skall fastställas tidigare och att den skall få en mera framträdande plats i kongressprogrammet. För nästa års kongress, som skall vara i Reykjavik på Island, föreslås ett ämne som ansluter sig till Unescos tema om rätten till kommunikation. Språkfrågorna är en väsentlig del av kommunikationen.

Ulla Luin



En la kunsidoj de la Komitato de UEA oni ofte vidis *Sten Svenonius* el Malmö inter la aŭskultantoj. La Komitato estas la decida organo de Universala Esperanto-Asocio, kaj en ĝi ĉiu aliĝinta landa asocio havas po unu aŭ plurajn reprezentantojn. Ĉiu kiu volas, rajtas aŭskulti la kunsidojn, ĉar parto de la salono estas por publika.

«La Komitato estas juneca», diris *Sten Svenonius*. «Oni povas senti iom da fido al ĝi».

Har din förening tänkt på höstens kurser? Om inte är det hög tid nu. Du ställer väl själv upp!



Nybörjarkurs?

Välj någon av dessa böcker

EK!

Boken för självstudier, som har visat sig passa ovanligt bra för kurser också, speciellt när läraren inte är alltför driven esperantist.

Häftad

28,50

ALLAS ANDRA SPRÅK

(E. Malmgren) Välkänd, lättanvänd, omväxlande och roande lärobok, speciellt gjord för kurser.

Häftad

9,40

ESPERANTOKURS

(F. Lindén) Mera omfattande lärobok med utförliga grammatiska förklaringar. Den kräver mer förarbete av läraren.

10,60

och komplettera med

INTERNACIA ELPAROLO

Uttalsskiva med texthäfte, intalad av flera kända internationella röster.

7,65

LILLA ORDBOKEN

(E. Vilborg) Behändig och modern svensk-esperanto och esperanto-svensk fickordbok.

Inbunden

14,10

EL LA VIVO DE ZAMENHOF

(G. Henriksson) Dr Zamenhofs ungdom skildrad i enkla fraser just för nybörjare.

Häftad

3,25

Om du tror att någon annan bok kan passa bättre, beställ den hos oss! Vi kan skaffa den!

Esperantoförlaget

Fack, 200 42 Malmö, postgiron 578 - 5

Kalocsay: Ave atque vale!

Cezara, oni ofte diris, estas la vizaĝo de Kolomano Kalocsay.

Pri la latina lingvo, pri la kulturo de antikva Romo, ja bone sciis Kalocsay; sed lia imperio estis pli vasta ol tiu de la Cezaroj. Li tradukis el la latina, helena, hungara, franca, angla, itala, germana, rusa, hispana, portugala, rumana, pola; verŝajne kun helpo de aliaj tradukoj, li rekreis ankaŭ el la antikva egipta, la ĉina, japana, hebrea, bengala, sumera. Kaj li regis la lingvon, kiun oni parolas en ĉiuj kontinentoj; li estis la imperiestro de la Verdstela Krono.

La imperiestro Aŭgusto, laŭ tradicio, fieris, ĉar li trovis Romon brika, kaj lasis ĝin marmora. Preskaŭ tion faris Kolomano Cezaro al nia lingvo esperanto: lia senkompara literatura laboro modifis multajn konceptojn pri lingvo ĝis tiam iom primitiva, eltrovis multajn novajn latentajn belaĵojn kaj riĉaĵojn en genia kreitaĵo de Zamenhof. Li esploris per multaj diversaj vojoj la eblecojn de esperanto por rimo, metriko, tropoj, vivanta vortomuziko, animskua koncizeco, sprita humuro, intensa tragiko, eĥoj de diversaj nacilingvaj stiloj, tute novaj lingvaj rimedoj unikaj je esperanto.

Estus amuze, se ne tiel amare plorinde, ke kiam la genio de Kalocsay komencis brili, kvazaŭ stelo ne nur brilis eksterordinare, sed mem iel larĝigis la tutan firmamenton, plej gravis por multaj liaj malmultaj neologismoj, proporcie tiel nesignifaj. En la perspektivo de la historio, tiu debato ŝajnas nekonscia satiro kontraŭ la esperantistaro kaj kontraŭ la etmenseco de ni banaluloj. Ĉar, kompreneble, ne necesas aprobi ĉiujn liajn neologismojn, por kompreni, ke Kalocsay estis pli zamenhofa ol preskaŭ ĉiuj, kiuj atakis lin. Li ne esence modifis la lingvon; li ne atencis la Fundamenton; li nur profunde esploris la lingvon, sciencen, en la *Plena Gramatiko*, en artikoloj, en kontribuadoj al la *Enciklopedio* de 1933, en *Vojaĝo inter la Tempoj*; pli grave, arte, en sia kolosa, senkompara kreomonumento de tradukitaj kaj originalaj poemoj. Li levis la konatan lingvon al pli alta nivelo.

Li estis la ĉefo de tiu unike brila hungara skolo, kies tuta kontribuado al esperanto estis eĉ pli granda ol tiu de la kronita Cezaro: ni pensu pri Julio Baghy, Ferenc Szilágyi, Lajos Tarkóny, Emba, Szathmári, ekzemple. Li estis ankaŭ la ĉefa inspiranto de la skota skolo — Auld, Rossetti, Dindwoodie, Francis. Kredeble li influis iel al ĉiu esperantista poeto nuntempa kies meritoj estas gravaj; influis rekte aŭ per jam kreita arta tradicio.

Estis Kalocsay, kiu sigelis min mem por esperanto. En 1949 mi ekstudis la lingvon pro idealismaj motivoj; sed mia entuziasmo ne estis granda; mi legis kelkajn negravajn verkojn, tre seninspiran tradukon el Ŝekspiro; mi estis preta kredi, ke esperanto utilas por turismo aŭ poŝtmark-kolektado, sed ne por ia celo grava al la spirito. Mia instruisto pruntis al mi *Sreĉita Kordo*; mi ricevis la sanktan fulmon, kiu brulmarkis min verdstele por la tuta vivo. Jen lingvo, per kiu oni po-

vas esprimi la plej delikatajn aŭ plej grandskalajn konceptojn; lingvo por artistoj, profetoj, ĉefpastroj de la intelekto aŭ girlanditaj oferistoj de la emocioj.

En tiuj neforgeseblaj horoj mi vidis esperanton laŭ tute nova skalo; kaj tio estas eble la esenca kontribuo de Kalocsay al esperanto. Lia tuta pensmaniero estis grandskala; kaj li ankaŭ sciis, ke la artisto, kiu volas vere krei grandskale estas ĝuste tiu artisto, kiu devas plej atente zorgi la etajn detalojn. Plej disciplinita metiisto pri ĉiuj lingvaj rimedoj, rigora elektanto ne de vorto kiu sufiĉos, sed de la ĝusta vorto, senĉesa esploristo pri novaj ebloj de formo kaj stilo, li samtempe havis konceptojn laŭ skalo de arkitekto, astrono-

mo — aŭ imperiestro.

Liaj atingoj kiel tradukisto estis tiaj, ke kiam mi volas interesigi angle parolantajn klerulojn, kutime fakulojn pri literaturo, pri esperanto, mi preskaŭ ĉiam montras al ili tradukojn de Kalocsay, hungaro, el la angla literaturo.

Eble mi varias la menuon per kelkaj el la geniaj tradukoj de Auld kaj Rossetti; sed jen la miraklo: ke hungaro povas tiel traduki el Keats, Shelley, Ŝekspiro, ke li skuas la reziston de tiaj fakuloj. Mi devas nur laŭtlege parton de lia virtuoza traduko de *La Korvo* de E.A. Poe por konvinki, ke esperanto taŭgas por poezio. Simile, al iu, kiu adoras la latinan-helanan kulturon, nur legi liajn tradukojn el Sapfo, el Katulo... Mi mem, fakulino pri angla literaturo, estas saturita de Ŝekspiro; sed legante la tradukojn de Kalocsay, mi emocie frostotremas foje pro la perfekteco de trovitaj trafaĵoj liaj, ekvivalentoj, kiujn mi ne povus post dektaga pripensado trovi; kaj mi ankaŭ konas nekleran sed inteligentan anglon, kiu iam konfesis al mi, ke li pli bone komprenas Ŝekspiron en la Kalocsay-tradu-



koj ol en la originala angla lingvo.

Eble ne necesas nun multe plori pri la morto de Kalocsay. Li mortis nur kiam li estis vere aĝa, plenumis grandan artan destinion, kaj postlasis senmortan trezoron senkomparan, revolucion pri la artaj kriterioj de esperanto, ĝojon por homoj ankoraŭ ne naskitaj. Eble li nun praktikos artojn, kiujn ni en nia mondo ankoraŭ ne povas eĉ koncepti; sed eĉ se tiu unika spirito plene estingiĝis, la atingoj de lia vivo estis unu el la mirakloj de nia mirakloplena lingvo kaj ĝia historio.

Lasu min iom plori; al mi li donis personan amikecon, indulgeman kuragiĝon, belan gastamon, kolegan simpatian pli ol mi povus meriti. Estas ĉiam malgajige, pensige, kiam granda homo finfine pagas sian ŝuldon al natura leĝo. Sed meze de tia funebrado devas brili danko granda, eĉ ĝoja. Ni ĉiuj devos morti; sed Kalocsay faris tion, kion nur kelkaj geniuloj en ĉiu epoko faras; li vivis tiel, ke li modifis tutan kulturon, maturigis lingvon, postlasis multkapelan, muzikoplanan, vitralojuvelitan katedralon de arto.

Marjorie Boulton

Kalocsay: Nia plej modela stilisto

Kalocsay estis hungaro, samkiel la alia parto de nia ĉefa steloparo, Baghy. Ambaŭ naskiĝis samjare, en 1891. Ambaŭ estis ĉefredaktoroj de «Literatura Mondo» en Budapeŝto. Kaj ambaŭ estis mobilizataj dum la unua mondmilito. En iliaj verkoj resonas verkioj de sangsaturita mondo kaj sopire ekmuĝas kant-ondoĵoj pri kompreno, intergenta paco...

Doktoro K. Kalocsay estis ĉefkuracisto. Kaj profesoro. Esperanta akademiano. En la esperanta literaturo li estas kreinto de la poezia artlingvo. Precipe konata kiel traduk-artisto el 22 lingvoj (Eterna Bukedo), precipe el la hungara (Hungara Antologio, La Tragedio de l'Homo de Madach), itala

(majstra redono de la tercinoj de Dante en infero), angla (Shakespeare: Reĝo Lear, Somermeznokta Sonĝo, La Tempesto).

Nia eta revuo kun sia malgranda esperantlingva spaco apenaŭ ebligas al ni mencii ĉiujn verkojn de Kalocsay. Sed ni ne povas transalti la kongenian tradukon de la versa popolfabelo de majstro-poeto Petöfi, Johano la Brava, kaj Kantanta Kamparo (traduko de 101 hungaraj popolkantoj). Kalocsay ne nur redonas klare la sencon, sed ankaŭ la ritmon de la originalo. Liaj kantradukoj estas vivaj, viglaj, facile rekanteblaj (Kalocsay scipovis pianludi, eĉ komponi).

En la «Rimporretoj» li kun sprita bonhumoro koncize kaj trafte prezentas al ni



*Streĉita kordo! Gojo kaj lamento
Vibrigis vin. Sed ili al la brust'
Delonge fremdas kaj indifere
Jam kovras ilin per dikpola krust'.
Kordo, vi longe kuŝis en silento,
Jam eble vi eĉ raukas pro la rust' ...
Resonu tamen la kaŝitajn kantojn,
Vi eble povos trovi aŭskultantojn.*

*Malnovaj kantoj! Ho, ĉu estas ili
La miaj do? Mi ja ne scias mem.
Ĉu sentojn tiel povis mi elkzili,
Ke min ne tuŝas jam ilia trem' ?
Ĉu tiel povas mi min malsimili,
Ke sen kompren' mi miras pri poem',
Kiun mi kantis iam larne, sange ?
Ho, jes ja, tiel estas, eĉ se strange.*

*Mi iris, iris tra la vivo vage
Kaj vibris mia kordo sub la arĉ',
Kantante: ĉu revadas mi senage,*

ĉiujn elstarajn figurojn de siatempa Esperanto-mondo.

Elstaraj lingvaj verkoj: Plena Gramatiko de Esperanto kaj Parnasa Gvidlibro (ambaŭ lastaj en kunlaboro kun Waringhien). En ĉi lasta prezentiĝas rimo-paroj kun rimarko «ni ĉion donas krom genio»...

ĵuloke li prave plendas «versoĵojn oni ne aĉetas»...

En «Lingvo, Stilo, Formo» li klarigas multajn dubajn punktojn en la gramatiko kaj stilistiko.

Kalocsay estas la majstro de la formo, patro de la tradicia poezio en nia lingvo. Kvankam lia verkado estis ĉefe modele traduka, mi persone plej admiras lian originalan poemaron en «Streĉita Kordo» (i.a. Sonorilludon, Kongresan Runon, Ezopan Fablon kaj Kisojn).

Kolomano Kalocsay estas nia plej modela stilisto, al kiu nia literatura historio ŝuldas eternan dankemon. W. Auld en Esperanta Antologio diras: «Tiel longe kiel nia lingvo vivos — eĉ se la homoj de postaj jarcentoj kunportos ĝin al aliaj planedoj kaj pli malproksimen — oni legos kaj amos la poemojn de Baghy kaj Kalocsay». Legu-relegu ilin ankaŭ vi mem!

Tiberio Morariu

Vizito: Simpatio al la ideoj de la e-istoj

«La pliakriĝanta lingva situacio en la internaciaj forumoj povas nur plifortigi la ŝancojn de esperanto», konkludis la duonhoran interparolon Bernt Carlsson, la internacia sekretario ĉe la estraro de la sveda socialdemokrata partio.

La interparolon iniciatis dro Alberto Menabene el Romo, kiu survoje al la IFEF-kongreso en Skellefteå haltis i.a. en Stockholm por havigi subtenon por la propono de la italaj socialdemokratoj rilate al esperanto. Akompanis lin grupeto de svedaj esperantistoj.

Dro Menabene mallonge prezentis la esencajn punktojn de la propono de lia partio (vidu *La Espero* 5/74), kaj petis la helpon de la internacia sekretario por disvastigi la opiniojn esprimatajn en ĝi ankaŭ inter la svedaj socialdemokratoj. Ĉar la teksto de la itala propono jam ekzistas publikigita en la sveda (eldonita de SEF kaj SLEA kunlabore: «*Frågan*

om ett internationellt språk — Esperanto som lösning») estus facile represi ĝin, ekzemple en iu membrogazeto.

Bernt Carlsson devis konfesi, ke la lingvokono de la svedoj tute ne estas tia, kian oni imagas al si. Nur ĉiu kvara svedo iom konas ian fremdan lingvon, kaj la procentaĵo multe malkreskas, ju pli aĝan grupon oni havas. Speciale sentebla estas la manko de kono de fremdaj lingvoj ĉe lia partio kaj ĉe la membroj de la sindikatoj, kiuj ne havas multjaran edukitecon.

Li ankaŭ rimarkigis, ke la lingva konflikto fariĝis sentebla ankaŭ en la Socialista Internacio, kie li reprezentas la svedajn socialdemokratojn. Tie ĉefe la franclingvanoj ne plu akceptas ludi lingvan subrolon.

Bernt Carlsson ankaŭ diris, ke li simpatias kun la ideoj de la esperantistoj kaj ke li povos helpi disvastigi ilin en sia partio. «Sed nur

post la elektoj», li aldonis, ĉar antaŭe li ne havas tempon. Li ne povis promesi, ke la teksto de la itala broŝuro aperos en iu publikaĵo. Li eĉ opiniis, ke aperigo ne donus ian rezulton. Li proponis anstataŭe, ke oni disponigu al li kvanton da broŝuroj, kiujn li utiligos en unu el la aŭtunaj konferencoj kun la respondeculoj pri internaciaj kontaktoj ĉe la distriktaĵ estraroj de la partio. Li estis certa, ke tiaspeca informado (ili devus siavice informi aliajn) donus pli grandan rezulton.

En tiu ĉi konteksto ni povas ankaŭ mencii, ke la prezidanto de la socialdemokrata partio, ĉefministro Olof Palme, jam antaŭ kelkaj monatoj sendis al la redaktoro de *SLEA-Infornilo* mesaĝon, kiu tekstas jene:

«*En la laborista movado la internacia engaĝiĝo ĉiam elstaris — la interesiĝo pri internacia kunlaboro, la volo lerni pri la rilatoj en aliaj landoj, la deziro ligi kontaktojn trans la limojn.*

La esperanto-movado ĉirilate multe kontribuis. Per ĝi multaj en la sveda laborista movado havigis al si kontaktojn kaj elrigardojn.

Mi mem neniam vidis iun kolektitan verkaĵon pri «La sveda laborista movado kaj esperanto». Eble tia verkaĵo ne ekzistas. Alie estus tre interese, se iu evidentigus la kunligon inter klerigsoifo, internacia engaĝiĝo kaj studoj de esperanto.

Mi estas nome konvinkita, ke tia kunligo ekzistas. Mi kredas, ekzemple, ke la internacia interesiĝo en la sveda laborista movado en la 20-aj kaj 30-aj jaroj vekigis pro tiaj okazaĵoj kiaj la intercivitana milito en Hispanio, la internaciaj kontribuoj de Branting — kaj lernado de esperanto kaj la kontaktoj kiuj sekvis el tio.

Mi do opinias, ke la esperanto-movado konstruis iom de la bazo al la internacia interesiĝo kiu hodiaŭ ekzistas en la laborista movado.

Per tio estas ankaŭ tute evidente, ke la esperanto-movado kun rajtigita memkonscio povas aserti, ke ĝi ankaŭ estonte havas gravan taskon en la akcelo de internacia interkompreniĝo kaj kunlaboro.

La ĉefministro finis sian mesaĝon per bondeziraj vortoj al la (tiam) venonta SAT-kongreso.

Franko Luin

Gazetaro: «Fokuso» pri interlingvistiko

Ebbe Vilborg eldonas regule — aŭ pli ĝuste sporade — bultenon «Fokuso, Interlingvistica cirkulero».

Por fakuloj ĝi certe estas tre interesa; por la esperantomovado estas grave ke publikaĵo pri interlingvistikaj aferoj aperas.

Sed inter la fakartikoloj kaj la registroj pri interlingvistikaj eldonaĵoj, en aliaj lingvoj kaj en esperanto, ankaŭ nefakulo trovas interesajn kaj ĝuindajn aferojn.

Ekzemple en n-ro 14/1976 (la unua numero de 1976) troviĝas komento pri la libro «*Word Play*» de la antropologo Peter Farb. Tiu skribas pri internacia lingvo i.a.: «*Nek Eo nek iu alia arta lingvo atingis dataran akceptiĝon — pro kelkaj malavantaĝoj, kiuj koncernas la bazan funkciadon de lingvoj. Tuj kiam artefarita lingvo gajnis grandan nombron da anoj, ĝi komencas ŝanĝiĝi en la sama maniero kiel naturaj lingvoj konstante ŝanĝiĝas. Malgraŭ la granda disvastiĝo de Eo, ĝiaj parolantoj havis malgrandajn eblecojn uzi ĝin en ĉiutaga konversacio. Problemoj pri lingvouzo aperis, kiuj ne povis esti solvataj, ĉar Eo ne estas proprieto de lingva komunado kun propraj reguloj kaj normoj. La manko de koncentritaj grupoj de denaskaj parolantoj malebligis la uzadon de la reguloj de la lingva ludo. Mi ne povas vorte dueli en Eo, nek mi povas akompani miajn vortojn per gesta sistemo karakteriza por tiu lingvo. Se mi en Eo dirus: Kien li iras?, mi ne havus ian eksterlingvan (paralingvistic) metodon por esprimi, per tono, emfazo aŭ akcento, mian ĉagreniĝon, malpaciencon, maltrankvilon, miron aŭ ion ajn al alia E-parolanto.*

Ebbe Vilborg komentas: «*Mi pensas, ke tiu*

*argumentado estas interesa, ĉar ĝi reprezentas novan tipon de rezonado, kiun ni supozeble renkontos ĉiam pli: per la kreskanta intereso pri interdisciplinaj studoj, ankaŭ aliaj sciencistoj ol lingvistoj okupiĝos pri la problemoj de internacia lingvo. Sur la lingvistika tereno, la antropologo kompreneble ne estas tre sukcesa. Kelkaj liaj asertoj nur montras, ke li havas nenian kontakton kun la esperanta movado: ke oni ne povas vortdueli en Eo estis evidente malĝusta aserto.... Sed kion diri pri liaj eksterlingvistikaj argumentoj? La tezo de la aŭtoro tra la tuta libro estas, ke lingvo kaj kondutaro reprezentas du interaĝantaj sistemoj de komunikado. Certe li pravas dirante, ke esperantisto ne disponas pri internacia gestaro. Tamen ĉiu, kiu lernas fremdan lingvon, estas pli malpli en la sama situacio: kiam mi studas la italan, mi ĝenerale ignoras la gestojn de la koncerna popolo. Eble estus konvena tasko por niaj sociolingvistoj atenti la (eventualajn) gestojn de la esperantistoj, kaj por niaj lingvistoj normigi la emfazajn rimedojn. Akcento k.t.p. ja tute nature apartenas al la lingvaj esprimiloj. Ĉiu el ni ja scias, ke ni per akcento povas substreki la cititan demandon: **Kien li iras?** Ni eĉ povas per transmeto doni plian emfazon: **Li iras kien?** Tamen ne estas facile trovi menciojn pri tiuj eblecoj en niaj lingvaj manlibroj. Oni do povas kompreni, ke eksterulo, kiu probable neniam ĉeestis vivan esperantan konversacion, kredas ke tiuj rimedoj mankas en la lingvo».*

«Fokuso» estas havebla ĉe E. Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg.

Obo

Dankon!

SEJU, la junulara organizo de SEF, ricevis 1000 kronojn donace de anonima donacinto.

Tiun monon SEJU bone povos utiligi nun, kiam ĝi planas informan kampanjon inter la gejunuloj. La mono plifortigas la budĝeton kaj SEJU estas tre dankema al sia anonima donacinto.

SEJU havas kompreneble grandan signifon por la estonteco de la sveda esperantomovado, tial eble la ekzemplo instigos al imito. Ankaŭ pli malgrandaj donacoj estas kompreneble bonvenaj. La poŝtgira numero estas 51 33 01 - 2, Sveriges Esperantisternas Ungdomsförbund, kaj la adreso SEJU, Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.

SAT: Laboranta kongreso en Göteborg


«Kio estas karakteriza por ĝuste tiu ĉi kongreso de SAT? Kio speciale distingas ĝin de aliaj SAT-kongresoj dum la lastaj jaroj?» Mi direktis la demandon al k-do Bartelmes sekretario de SAT kaj unu el la veraj pioniroj de la movado. Li respondis post kelksekunda pripenso: «Ĝi estis pli laboranta kongreso. Estis pli da laborkunsidoj, pli da fruktodonaj diskutadoj. Krome pli da altkvalitaj prelegoj».

Proksimume 350 esperantistoj el dudeko da landoj estis kolektitaj en Göteborg dum tiu, ĝenerale belvetera, lasta semajno de julio 1976. La centro estis la universitato de Göteborg, meze en la urbo, kaj la diversaj salonoj kaj kunvenejoj portis dum tiu semajno nomojn konvenajn al la internacia esperantomovado: Lanti (fondinto de SAT), Zamenhof, Egaleco, Frateco. Malavantaĝo estis, ke la kongresanoj loĝis iom longe for de la kon-

plej gravaj punktoj sendube estis la oficiala akcepto en la merkreda vespero far la Centra Organizo de Sindikataro en Göteborg. Svedio ja havas tre fortan kaj unuecan sindikatan movadon, kaj la eksterlandaj partoprenantoj montris grandan intereson pri ĝenerallaj sindikataj problemoj. Partoprenis por la Sindikataro Carl-Otto Janson, sindiko en Göteborg, kaj Lars Johanson, kiu reprezentis la socialdemokratran Laboristan Komunumon de Göteborg. La partoprenantoj estis regalataj per buterpanoj.

El la programo cetere oni povas mencii teatran vesperon, folkloran vesperon en la parko Slottsskogen, kie trupo el Vestrogotio prezentis svedajn popoldancojn, duontagan ekskurson en la arkipelago norde de Göteborg, kaj tuttagan ekskurson al la najbara Danlando kun Fredrikshavn kaj Skagen.

Pri la prelegoj oni povas diri, ke ili am-



Lennart Åberg, prezidanto de OKK salutas la partoprenantojn al la SAT-kongreso. Ĉe la tablo sidas k-do Bartelmes kaj k-do Levy.

gresejo, sed rekompence ili pagis nur tre moderajn prezojn. Kie en Svedio oni ricevas nuntempe hotelĉambron por nur 20 kronojn po nokto? Cetere la komunumo de Göteborg zorgis pri tio, ke la kongresanoj povis tute senpage veturi per la tramoj tra la urbo.

La solena malfermo okazis en la dimanĉo, la 25-an de julio, kiu estis unu el la plej varmaj tagoj de la somero en tiu regiono. Malgraŭ la ŝvitado de la partoprenantoj la malfermo fariĝis impona kaj solena manifestacio. Speciale tuŝis la korojn la komuna kantado de la Internacio, ĉar la SAT-anoj estas grupo, kiu vere scipovas kanti tiun kanton, kiu ja — laŭ sia nomo — vere konvenas por la lingvo internacia.

La raportanto mem bedaŭrinde ne povis partopreni ĉiujn el la aranĝoj, kaj sekve tiu ĉi raporto ne povas esti tro detala. Sed unu el la

pleksis temojn, kiaj «La borso, ĝia funkcio kiel financpumpilo» de Pierre Levy kaj «Lingvo kaj realo» de S. Arse.

Ni ankaŭ menciu, ke post la malfermo en la unua tago, la kongreso vizitis la tombon de Einar Adamson kaj metis florojn sur ĝin. Einar Adamson estis pioniro de la sveda laborista esperanto-movado, kaj certe ĝojigis la kongresanojn, ke partoprenis lia vidvino, Elna Adamson.

Konklude ni povas diri, ke la 49-a kongreso de SAT en Göteborg estis sukcesa aranĝo kaj la loka OKK certe faris grandegan laboron. En la lasta vespero en la restoracio Col-din/Bellini tute proksime al la kongresejo k-do Bartelmes dankis al OKK en la nomo de SAT, kaj direktis apartan dankon al la ĉeforganizanto Lennart Åberg.

Åke Blomberg, SAT-ano nro 29 252

Har din förening tänkt på höstens kurser? Om inte är det hög tid nu. Du ställer väl själv upp!



Fortsättningskurs?

Välj någon av dessa böcker

PAŜOJ AL PLENA POSEDO
(W. Auld) Övnings- och lärobok för högre studier med bl a fem språkövningar.
Häftad 21,75

SVENSK ESPERANTOGRAMMATIK (E. Carlén)
Kart. 17,65

och komplettera med

VIVO VOKAS
(S. Engholm) En originalroman om ungdom på utomordentlig esperanto, lätt men perfekt språk. Den mest använda boken för fortsättningskurser. 11,75

INTER SUDO KAJ NORDO
(F. Szilagy) Novellsamling i författarens livliga och ofta humorfyllda stil. 11,75

AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO
(A. Lienhardt) En ny sorts läsebok med gradvis ordnade dialoger i enkel stil för att få eleverna vana vid vanligt samtal.
Häftad 10,90

JAROJ SUR TERO
(L. Sinha) Självbiografi om författarens barndom och ungdom i Indien och studieår i Sverige, och slutligen om livet som vuxen i Indien.
Häftad 14,10
Inbunden 18,80

Om du tror att någon annan bok kan passa bättre, beställ den hos oss! Vi kan skaffa den!

Esperantoförlaget
Fack, 200 42 Malmö, postgiro 578 - 5

SEJU: Vekiĝis la dormeganto

Antaŭ unu jaro SEJU vekiĝis post kelk-jara dormado. Nun ĝi, la 8-an kaj 9-an de majo, sukcese aranĝis duan landan renkontiĝon en Västerås. La kunveno estis grandarea junulargastejo Lövudden, kiu situas ĉe Mälaren. Ĉi tiu gastejo ĉiujn kontentigis per bonega manĝaĵo kaj komfortaj ĉambroj. La vetero brilis.

Ĉirkaŭ 25 homoj partoprenis, kelkaj por la unua fojo en esperantista aranĝo. Trovi taŭgan distraĵon por la vespero ĉi-foje prezentis nenian problemon pro ĉesto de Hans-Peter Burman el Uppsala, kies eksterordinara kaj ĉionentenanta muzika talento, por ne diri eltenpovo, mirigis lian publikon. La muzikantoj cetere solvis la problemon pri ĉiam pli altaj tranoktadaj kostoj — ludante la tutan nokton!

La jarkunveno elektis parte novan estraron kies taskoj estos firmigi la membraron, (iom pli ol 100) per interna laboro kaj eksteren in-

formi pri esperanto en junularaj medioj. Kaj la jarkunveno kaj la pritemaj diskutgrupoj rezultis en pluraj bonaj ideoj, kiujn la estraro zorge atentis. Certe plej grave estos aranĝi por la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO universitatnivelan seminarion, verŝajne en Umeå, pri laponaj kaj eskimaj problemoj, en somero 1977. Atento al esperanto konstatale kreskas en universitataj medioj. Ĉi tion ni devas zorge varti.

Detalan raporton pri la jarkunveno kaj laboro de la nova estraro aperigas la organo de SEJU «ktp» (jarabono por pliaĝuloj 10 kr, poŝtĝironto 51 33 01 - 2).

Kiel postskribon mi mencias, ke proporcio mankas en SEJU gejunuloj ĝis 25-jaraj! Ni sekve petas ĉiujn klubojn apogi la junajn interesojn. Ni planas trian landan renkontiĝon en Skanio en aŭtuno.

Geoffrey Sutton
sekr. de SEJU

Recenzo: Litova muziko

*Litova kanto en esperanto
Melodija, 33-CM-03041-42
30 cm, 33t/m, stereofona*

Juna klubo en Vilnius, Litovio (Sovetunio) iniciatis la produktadon de disko kun estradaj kantoj de litovaj komponistoj, «*Litova kanto en esperanto*». Klubanoj tradukis la tekstojn, kaj popularaj kantistoj kantis akompanataj de i.a. la «Orkestro pri leĝera muziko de litova televido kaj radio».

Al sveda orelo, la muziko sufiĉe similas al tradicia dancmuziko de antaŭ dek-dudek jaroj. De tempo al tempo oni povas imagi influon ankaŭ el alia mondoparto. La melodioj ne tuj restas en la memoro, sed venas kaj malaperas ĝuste kiel dancmuziko.

Plejparton el la tekstoj tradukis V. Silas. La ritmo de la lingvo relative bone sekvas la ritmon de la muziko.

Teknike la disko estas bonkvalita. Tiu, kiu deziras diskon por havi malantaŭaŝ-muzikon povas bone elekti tiun ĉi.

La disko estas produktita jam antaŭ kelkaj jaroj (1973), sed ŝajnas tute nekonata ĉe ni. Ĝi meritis pli bonan sorton. Eble kulpas la devizaj problemoj inter orienta kaj okcidenta Eŭropo: se oni dissendas la diskon al siaj amikoj interŝanĝe al libroj, ĝi ne atingas vastan publikon. En Svedio la amiko de la junaj litovoj nomiĝas Åke Näsholm, Linderbergsgatan 4, 852 47 Sundsvall, kaj li peras mendojn je la prezo de 20 skr. Eblas ankaŭ mendi ĉe Eldona Societo Esperanto por 25 - 30 kr.

Ulla Luin

Alvoko: Utiligu la Pasportan Servon!

Ĉijare jam ĉirkaŭ 150 gastigantoj el 40 landoj partoprenas en la Servo. En Eŭropo la landoj kun adresoj estas: Aŭstrio (1), Belgio (3), Britio (10), Bulgario (2), Ĉeĥoslovakio (6), Danio (10), Finnlando (1), Francio (18), FR Germanio (25), Hispanio (2), Hungario (4), Italio (3), Jugoslavio (10), Luksemburgo (1), Nederlando (8), Polio (25), Rumanio (2), Portugalio (1), Svedio (7) kaj Svisio (4). La aliaj troviĝas ekster Eŭropo en ekz. Aŭstralio, Novzelando, Japanio, Usono kaj Kanado.

Se vi intencas vojaĝi eksterlanden venontsomere aŭ alian tempon, bonvolu mendi broŝuron de Pasporta Servo, kiu samtempe estas via membropruvo, ĉe la peranto en Svedio. Kostas 12 skr kaj tio inkluzivas la afrankon kaj aliajn kostojn. Vi nur menu tian per pĉk 9 14 18 - 4.

Jen la ideo de Pasporta Servo

La servo havas taskon rilatigi gastojn kun gastigantoj, kaj la gastigo kaj ties kondiĉoj estas libere interkonsentita inter gasto kaj gastiganto (daŭro de gastigo, manĝokostoj, transporto ktp). La tranoktoj estas senpagaj.

Jam nun vi povas aliĝi

al la servo kiel gastiganto por la jaroj 77, 78 ktp. Vi tiam ricevos la broŝuron senpage ekde 1977. Anoncu ankaŭ ĉe la peranto.

La servo nun bezonas almenaŭ 1 gastiganton en la konataj urboj de Svedio kiel: Malmö, Hälsingborg, Kalmar, Ljungby, Jönköping, Skövde, Karlstad, Halmstad, Örebro, Uppsala ktp. Tie ankaŭ troviĝas esperantistaj kluboj. Ĉu ne unu membro

en tiu aŭ alia loko povas aliĝi al la servo? La plej modera dormloko por via gasto estas loko sur la planko. Li mem eble havas aermatracon.

La peranto atendas viajn mendojn de la broŝuroj kaj viajn anoncojn.

Willem Posthuma
Soldatgatan 40, 723 45 Västerås
pĉk 9 14 18 - 4

Kluboj: Kontaktoj kaj foraj vizitoj

Kungälv

La esperantoklubo de Kungälv eldonas program-kaj informfolion, kaj el la 4-paĝa maja numero ni ekscias, ke la klubo aranĝis enketon pri virinaj problemoj. Oni ricevis respondojn el diversaj landoj, tamen neniun el Svedio.

Cetere oni dediĉas multe da spaco al la SAT-kongreso en la proksima Göteborg, kie certe membroj el la klubo kunhelpis.

Göteborg

Printempa festo estis aranĝata de la Esperantosocieto de Gotenburgo la 25-an de aprilo. Oni montris filmon koloran pri islando, havis viziton de la magiisto Carno kaj cetere aŭskultis al muziko kaj kantado de Nelo Castillo.

Alingsås

Tridek esperantistoj el Falköping, Vårgårda kaj Göteborg aranĝis en junio printempan renkontiĝon kune kun gesamideanoj el Alingsås. Oni havis simplan sed varian programon, kaj post la kunveno oni faris viziton al Nolhaga, la prahejmo de la terpomoj en Svedio.

Tiaj regionaj renkontiĝoj certe estas imitindaj ankaŭ por aliaj grupoj en Svedio.

Västerås

La junia numero de la VEK-a gazeto estas kiel kutime tre enhavoriĉa. «Gunilla» rakontas pri unusemajna vizito al Londono kaj Oxford kune kun «Curt-Åke», kaj tiu artikolo estas tiel interesa, ke ni represus ĝin en *La Espero*, se ni havus spacon.

Ili evidente kontaktiĝis kun esperantistaj ge-

amikoj kaj spertis kaj lernis multon, kion ĝenerale perdas ordinaraj turistoj.

Komence de majo la klubo havis viziton de Justin Minani, kiu prezentis sian hejmlandon, Burundio, kaj la terurajn cirkonstancojn en ĝi, kie estas malplimult-reĝimo.

Oni prezentas ambician programon por la aŭtuna agado.

Eldona: Jarkunveno en Malmö

Eldona Societo Esperanto jarkunvenis en Malmö la 19-an de junio. El la estraro eksiĝis Gulli Svensson kaj Gertrud Lund, kaj la prezidanto, Åke Blomberg, dankis al ambaŭ por fidela laboro kaj esperis pri daŭra apogo kaj kunhelpo. Novaj en la estraro estas Sten Svenonius, Malmö, kaj Hjalmar Andersson, Malmö, antaŭe anstataŭanto. Nova anstataŭanto estas Olle Persson, Trelleborg.

La prezidanto raportis pri la laboro por la nova sved-esperanta vortaro. La aŭtoro, Ebbe Vilborg, jam finpretigis manuskripton ĝis la litero E, kaj tiu manuskripto troviĝas en Stokholmo, atendante la liveradon de la disko kun esperantosignoj por nia kompostmaŝino. Geoffrey Sutton deklaris sin preta komposti la vortaron, kaj ni havas bonan esperon, ke ĝi aperos post unu-du jaroj.

De Bertil Nilsson alvenis informo pri permeso eldoni Aniara en esperanta traduko. Ŝajnas, ke fine eblos eldoni tiun klasikan verkaĵon de Harry Martinsson.

SEKVONTA NUMERO

aperos komence de oktobro. Lasta dato por manuskriptoj: **10-a de septembro.**

Forpasis: Boye, Kvist Otterfors, Stenström

Signe Boye

mortis fine de aprilo, 101-jara. La patrino de la verkistino Karin, Signe Boye lernis esperanton kiam ŝi estis 60-jara, sed fariĝis tiel

lerta, ke ŝi gvidis kursojn kaj kontrolis lingve esperanto-eldonaĵojn en Svedio.

Gunnar Otterfors

el Lidingö mortis fine de aprilo, 75-jara. Li estis popolinstruisto kun vastaj interesoj. Li kunlaboris en la radiaj dissendoj por la svedaj lernejoj, kaj en pli fruaj jaroj li tradukis i. a. du librojn el esperanto en la svedan.

Gunnar Stenström

mortis en Halmstad, 70-jara. Li estis multjara fidela membro de la loka klubo, kursgvidanto, pioniro de la loka agado. Dum multaj jaroj li korespondis kaj vizitadis eksterajn landojn.

Karl Kvist

forpasis la 20-an de majo post kelkmonata suferado pro grava malsano. Li estis 63-jara.

Dum sia tuta plenkreska vivo li aktive kaj energie batalis por paco kaj pli bona socio. Lia funda memedukiteco, persista laborado kaj neniam ŝanceliĝanta optimismo kreis respekton kaj admiron en ĉiuj rondoj.

Karl Kvist estis unu el la fondintoj de Mondpaca Esperantista Movado, MEM, kaj ĝia vicprezidanto ĝis sia morto. Li estis sveda peranto de «Paco» dum multaj jaroj.

Anoncetoj

Tiberio Morariu, iama ĉefdel. UEA en Rumano, sindiko SEF k. redaktoro de «La Espero», plurlanda kursgvidanto, festos la 28. sept. 1976 sian 55-j. Esp. aktivadon k. 75j. datrevenon en sia hejmo: Götaforsväg. 1, 124 30 Stockholm-Bandhagen, Svedl.

Eldoniston serĉas por 1) sia ilustrita memolibro «55 jaroj per Esperanto tra 20 landoj» Tib. Morariu.

2) Kiu emas reeldoni novelaron el la rumana literaturo: a) de M. Sadoveanu: Nobela Peko (ap. 1929); b) de Bratescu-Voinesti: Niĉjo Mensogulo (1927); c) de Emil Isac: Sonorilo k. Kanono (Proza Poemaro 1930). Ĉiuj trad. premiitaj de la Akademio de Esp.

Bv. sendi ofertojn al Tib. Morariu, Götaforsväg. 1, 124 30 Sthlm-Bandhagen, Svedl.

Korespondi deziras klubo «Juneco» en Vilnius kun junaj svedoj. Adreso: Vytautas Silas, Daukanto 8-9, Vilnius, SU-23 20 09, Litovio, Sovetunio

Per poŝtkartoj: s-ro Vladimir Rotrekl, Pa-lackého 15, CS-669 00 Znojmo, Ĉeĥoslovak.

Per poŝtkartoj, 16-jara: s-ro Vladimir La-zárek, Havlickova 16, CS-669 02 Znojmo, Ĉeĥoslovakio

Kun svedinoj: s-ino Erene Sarana, str. Aia 12-3, 20 29 50 Abja, Estonio, Sovetunio

29-jara inĝeniero kun vastaj interesoj. Pretas gastigi esperantistojn. S-ro Zygmunt Horodyski, Dwernickiego 27/m76, 04-396 Warszawa Pollando

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack,
200 42 Malmö

Ejo: Möllevångsgatan 20 B

Dejortempo: 1 sept — 15 majo: merkredo
10 — 11, ĵaŭde 17 — 18.

Skribaj mendoj ekspedatuj dum la tuta jaro,
ankaŭ dum somero.

Telefono: 040 - 12 20 29. Poŝtĝiro: 578 - 5.

Administranto: Anna-Greta Strönnen.

Helpanto: Wivi Nilsson.

Prezidanto: Åke Blomberg

Konstrui per

YTONG[®]

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

Skellefteå: I skuggan av IFEF-kongressen

i skuggan av IFEFs 28:e internationella järnvägsmanakongress höll SEF sin årskongress den 12 och 13 juni i Skellefteå.

Valet av tid och plats hade tydlig inverkan på deltagarantalet. Nära hälften av den skara som troget följer årsmötena uteblev. Skellefteå ligger tillräckligt långt bort för att många söder om Dalälven måste överväga sitt beslut om deltagande.

Skellefteå är en utmärkt stad att kongressa i. Dessutom är mitten av juni en lämplig tid att besöka Västerbotten. Perfekt väder och naturen visade sin allra bästa sida. De långa ljusa kvällarna dryggade ut tiden avsevärt.

SEFs årskongress startade med ett föredrag av Pentti Järvinen i Stadshuset. Han redogjorde för resultaten av experimentet med esperanto i undervisningen vid skolan i Somero och de påföljande kontakterna med de finska skolmyndigheterna för att få till stånd ett större experiment, i samarbete med de övriga nordiska länderna. Efter föredraget följde gruppdiskussioner om hur dessa kontakter och resultat kan användas här i Sverige.

En välbehövlig paus på två timmar gav deltagarna tillfälle att prova maten i någon av barerna på Epa och Domus. Båda varuhusen hade esperanto-veckan till ära översatt viktig information om bl. a. öppettider. Ja, Epa hade t o m översatt hela veckans meny på särskilda listor. Det var uppskattat.

SEFs årsmöte följde den normala gången. Jan Strönne hälsade välkommen och överlämnade en standar som tack för hjälpen åt Skellefteå Esperantoklubb. Därefter redogjorde han för den nya utmärkelsen som SEF fått från UEA, om vilken det står mera på annat ställe i *La Espero*.

Karl Gustavsson, Bergvik, valdes till att leda årsmötesförhandlingarna. Verksamhetsberättelsen klubbades igenom ganska snabbt, likaså den ekonomiska berättelsen. Revisorerna och årsmötet kunde sålunda bevilja styrelsen ansvarsfrihet för 1975.

Valberedningen föreslog omval av ordförande Jan Strönne och även omval av de flesta andra styrelseledamöterna, med undantag av Ragnar Hjorth, som bett om att stå utanför styrelsen. Valberedningen föreslog i hans ställe Roland Lindblom, Nynäshamn. Så blev det också.

I tur stod en diskussion om motionerna som lämnats till årskongressen. Den första och viktigaste motionen gällde ändring av

stadgarna. Efter beslut vid kongressen i Halmstad har stadgarna redigerats lite och presenterats i *La Espero* 3/76. Årsmötet godkände stadgeförslaget efter diskussion och votering. Bara tre röstade emot.

Andra motionen gällde anställning av ett särskilt ombud för SEF. Frågan har varit uppe många gånger tidigare, men ännu har ingen ekonomiskt kunnat lösa den.

Den tredje motionen gällde information till utbildningsministern om försök att införa esperanto i skolorna. SEF vill avvakta det slutliga resultatet av skolexperimenten, som nämndes i Järvinens föredrag tidigare på dagen.

I den fjärde motionen ville motionären att esperantister i sina dödsannonser och på sina gravar skulle ha ett särskilt emblem (stjärnan och korset). SEF vill inte förorda detta, utan det står var och en fritt att välja emblem.

Från Uppsala meddelades att en anonym givare skänkt SEF 10 000 kr till minne av Gösta Norling.

Ordförande Jan Strönne kunde slutligen meddela att platsen för 1977 års kongress blir Falköping.



Även barn underhöll kongressdeltagarna, här med en specialkomponerad barnballet.

Efter årsmötet kunde deltagarna söka sig upp mot Eddahallen, där IFEF-kongressen höll på att komma igång med interkona vespero. 580 deltagare hade sökt sig till Skellefteå, från 19 länder. För musiken denna och övriga kvällar svarade Kvarteto Esperanto från Trencin i Tjeckoslovakien: fyra killar som kan nästan allt vad modern dansmusik heter.

Söndagen bjöd på en rundtur med buss i och omkring Skellefteå, speciellt för SEF-deltagarna.

MÅNGA STANNANDE KVAR MED JÄRNVÄGSMÄNNEN

Vid tvåtiden på söndagseftermiddagen invigdes IFEF-kongressen med många och långa hälsningar av höga järnvägsmän från norra Sverige och från olika länders representanter. Många SEF-deltagare stannade kvar hela veckan och följde de olika arrangemangen, som f. ö. innehöll: internationell ekumenisk gudstjänst i Landskyrkan, dansprogram i Bonnstan (dels en mycket uppskattad barnballet, specialkomponerad för kongressen, dels typisk folkdans från Västerbotten), två halvdags utflykter, varav en gick mot Lövånger och den andra till Finnfors vattenfall och kraftverk.

Staden hade på tisdagskvällen stor mottagning på Expolaris utställningshall för kongressens deltagare. Senare på kvällen hölls ett forum där stadens representanter svarade på de utländska gästernas frågor.

Onsdagskvällen var vikt åt en mycket rolig och spännande fotbollsmatch. Ett lag från kongressen, bestående av alla slags fotbollsspelare, alltifrån rutinerade landslagsspelare till rena amatörer, mötte ett mycket skickligt damlag från Skellefetrakten. Flickorna tog ledningen med 2:0, men matchen slutade med esperantoseger 5:3.

Torsdagens underhållning var en «surpriza vespero». Höjdpunkten i den var ett teaterstycke framfört av Pola Esperanto-Teatro.

Fredagen skulle bli den mest innehållsrika dagen, och säkert den längsta dag deltagarna upplevt. Vid tvåtiden på eftermiddagen startade bussar mot norr och besökte Storforsen (Älvsbyn), Polcirkeln, Jokkmokk och lappstaden i Arvidsjaur. Vädret stod oss bi och klockan 24 kunde alla se och beundra midnattssolen.

Vid tvåtiden samma natt var vi i Arvidsjaur och där hölls den högtidliga avslutningen. Eftersom det var lika ljust som klockan två på dagen tycktes alla tidsbegrepp vara förlorade. Tillbaka i Skellefteå var vi vid fyra-tiden, och för många av deltagarna fanns inte många timmar kvar att sova ut innan tågen skulle börja rulla hemåt igen.

Inga Johansson

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet, Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.

Besöksadress: Hägervägen 31. Postgiro: 20 12-3.

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Telefon: 0510 - 286 42 (arb. 0510 - 221 30).

Medlemsavgift för direktansluten medlem 30 kr, ungdomsmedlem 15 kr, familjemedlem utan tidning 10 kr.

Prenumerationspris 30 kr.

Förbundets sekretariat är öppet onsdagar kl. 18 - 20, tel. 08 - 48 99 76.

Tryck: Sturetryckeriet AB, Stockholm 1976